

## La 40a ILEI-Konferenco, Ranzan, Japanio

### Protokolo de la Komitataj kunsidoj

#### la 14-an de aŭgusto 2007

- 1.1 Zsofia Korody salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.
- 1.2 Zsofia Korody kontrolas la kvorumon, la komitatanecon kaj anstataŭon de aliaj komitatanoj; rezultas 20 da eblaj voĉdonoj
- 1.3 - Rob Moerbeek proponas: la eron *eksteraj rilatoj* oni enŝovu en la 4-an punkton de la tagordo; akceptita
  - Ronald Glossop proponas pridiskuti la 6-an programeron antaŭ la 4-a kaj 5-a pro graveco decidi nepre antaŭ la foriro
  - Lucille Harmon dubas pri la okazigo de ILEI-konferenco en Benino
  - Voĉdono pri ŝanĝoj: 5 por, 11 kontraŭ, 3 sindetenoj
- 1.4. - Zsofia Korody prezentas resumon de la pasintjara protokolo en Parmo
  - voĉdono: ĉiuj estas por
- 1.5. – Aida resumas: funkcia komisiono pri - lerneja agado
  - ekzamenoj
  - grupoj por projektoj
  - scienco kaj universitatoj
  - Rob Moerbeek proponas kunlaboron kun ISAE, handikapuloj
  - Aida reagis: la scienca kaj universitata komisiono inkluzivas tion
- 2.1. Zsofia Korody legas resumon de la jarraporto, kompilita de Radojica Petroviĉ
- 2.2. Zsofia Korody raportas pri - seminario en Afriko
  - seminario por instrukapabligo (maje) en Svedio, gvidis Radojica Petroviĉ
  - kunsidoj por prepari la novstilan referenckadron por ekzamenoj
- 2.3. – raporto de Atilio Orellana Rojas, pri Internacia Ekzamena Komisiono (IEK)
  - raporto de la Lerneja Komisiono – prezentis Mihai Trifoi
  - Mihai Trifoi resumas raporton de la Terminologia Komisiono; oni uzas pli kaj pli la Vikipedion
- 2.4. - raportoj de landaj sekcioj kiuj ne sendis raporton kaj ĉeestas:
  - Francio: Michel Dechy: projekto Fringoj ricevis monsubtenon de francoj, semajno por instruistoj en Kvinpetalo
  - Kroatio: kunveno por infanoj ĉe la marbordo
  - Svedio: tri grandaj E-aranĝoj en 2007:
    - literatura konkurso
    - koresponda kurso
    - aktivado por lernu.net
- Aida Ĉizikaite: - Nepalo intencas starigi landan sekcion

- 600 personoj en E-kurso en Ĉinio
- neŝanĝo de la statuto
- mankas raporto de la kasisto; la raporto alvenis rete en formato neelŝutebla, post la somero ĉiuj ricevos la raporton

Oni atendas helpon de UEA. Escepte de la financa raporto oni aprobis la raportojn, kun peto al la landaj sekcioj por sendi la mankantajn raportojn.

Voĉdono: 19 por

1 sindeteno

### la 16-an de aŭgusto 2007

(daŭrigo)

5. - Mihai Trifoi anoncas buĝetajn detalojn por 2006 alvenintajn rete
  - finkalkuloj estos pretaj
  - nebuĝetitaj libroj
  - seminario planita
  - pri Afrika seminario
  - drasta malaltiĝo de abonoj por *Juna Amiko*
  - malmultaj kotizoj
  - por 2007 - 4 gravaj aktivaĵoj: seminario en Afriko
    - Flugiloj* kun novedukitaj trejnistoj eldono
    - nova simpozio en Japanio
  - Zsafia Korody: - kunsido en Budapeŝto por helpi al Stefan MacGill; estas helpanto por li por prizorgi varbadon.
    - peto de Atilio Orellana Rojas por ne ŝanĝi la abonkotizon por la sekva jaro.
  - Denis Keefe demandas: kiom da abonantoj, kiom ili pagas
  - Zsafia Korodi: 10 novaj abonantoj dum ŝia deĵoro dum la UK
    - 8 novaj abonantoj en Germanio
    - 272 jaraj abonoj (postnoto 2013: certe estis pli ol tio.)
    - 14 € / jare por 3 numeroj
  - Lucille Harmon proponas diskuton por varbi, por ne labori deficite
  - Gunnar Olsson proponas 3 kategoriojn de abonoj, anstataŭ 2 (pagi nur la sendokostojn)
    - Rob Moerbeek: la nuna 2-a kategorio estas tia
    - voĉdono por ke la abontarifo restu neŝanĝita: 18 por
- 5.2. - Mihai Trifoi proponas: sekcio en riĉaj landoj pagu IPR kaj membrokotizon por la malriĉaj landoj
  - Aida Ĉizikaite: - aliaj fondaĵoj: ILEI-konferenco en Afriko (nova)
    - donacis sian kotizon al la Afrika konto
    - detaloj pri la Afrika ILEI-konferenco:

- kotizo estas 5 € por la afrikanoj / kategorio C
- 282 € por unulita ĉambro, klimatizilo, manĝaĵo
- 139 € por 4lita ĉambro, restado, manĝaĵo

### 5.3. Kasisto sendos la raporton aŭtune

(reveno al)

#### 3.1 - honoraj membroj: venis biografio de Irena Szanser – Pollando

- voĉdono: unuanime por
- Wil van Ganswijk – Nederlando
- voĉdono: unuanime por

#### 3.2. Zsofia Korody: - Probal Dasgupta ne plu povas prezidi la Internacian Ekzamenan Komisionon (pro sia UEA-prezidanteco), propono: Mireille Grosjean

- propono por nova membro: Monika Molnar loĝanta en Svislando
- voĉdono: 16 por  
1 sindeteno
- ŝanĝoj en la regularo de IE:
  - anstataŭ *minimume 3 membroj de IEK estu minimume 2*
  - art. 6: „gramatika testo” anstataŭ „antaŭtesto”

Dennis Keefe proponis antaŭekzamenon senpagan, por allogi ekzamenontojn.

- art. 7: „Kandidato ricevinta la noton „malsukcese”

ricevas de EK anstataŭ atestilon.

Voĉdono: por 17  
kontraŭ 0  
sindeteno 0

#### 4. Mihai Trifoi proponas: - daŭrigi la projekton *Malfacila vento...*

- daŭrigi kurson de grupkvidantoj por INTERKULTURO
- plifortigi komunikadon inter Eo-instruistoj

Voĉdono por subteni UAM en Ranzan: ĉiuj estis por

Dum la UK en Jokohamo Katalin Kovats petis partnerecon kun ILEI.

Voĉdono: ĉiuj estis por.

#### 6. Aida: la simpozio – ĉefa atingo

seminarioj – sukcesaj

lingva festivalo – sukcesa

gustumo de japana kulturo

ILEI-konferenco en 2008 – en Benino

ILEI-konferenco en 2009 – sin anoncis Finnlando, Hispanio, Rumanio

- Slovenio estis elektita

Fermo.

Protokolis: Aurora Bute – Zsofia Kórody.